



# aktuala

## 35-a ELDONJARO

**Esperantista Brusela Grupo**, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com, Abona membriĝo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, nurja @ belcenter.com, informas Hélène Falk-Bracke +32 2 3584214, helene.falk @ skynet.be; Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono).

In formoj: ... <http://users.belgacom.net/EBG>; [ebg.skynetblogs.be](http://ebg.skynetblogs.be); [xurb.leadhoster.com](http://xurb.leadhoster.com); [esperanto.net](http://esperanto.net); [esperanto.be](http://esperanto.be); [lernu.net](http://lernu.net); [uea.org](http://uea.org); [liberafolio.org](http://liberafolio.org); [eo.eventeo.net](http://eo.eventeo.net); [sites.google.com/site/ebgaktuala](http://sites.google.com/site/ebgaktuala); [sites.google.com/site/panb2001](http://sites.google.com/site/panb2001)

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

## ENHAVO

- Paĝo 2 - Hélène Falk-Bracke pri gramatiko
- Paĝo 4 - Agado de EBG kaj promenadoj belgaj esperantaj
- Paĝo 5 - Nico kaj Birdino pri Poliglota Kunveno kaj Pasporta Servo
- Paĝo 6 - Nova UEA kaj Esperantaj Kanibalaj Eŭropaj Patriotoj
- Paĝo 9 - Barelo Litova kaj Esperantaj Eventoj
- Paĝo 10 - Jacob Hasbun pri Arabaj Noveloj
- Paĝo 11 - Poemaro de Garcia Orive, Raymundo Souza, Miša Bronštejn
- Paĝo 10 - Árpád Rátkai pri Stelo kaj Flago kiel Simboloj de Esperanto
- Paĝo 13 - Longa Kolego de Jonh C. Wells, prezidanto de la Akademio
- Paĝo 16 - Proverboj kaj Dirajoj Esperantaj

## PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

- Marto 2010**
- 3 Barbara Poterucha daŭrige pri nia sano
- 10 Semajna kunveno
- 17 Bernard-Regis Larue pri la plej diversaj lunoj de Saturno (prokrastita de la 17a Februaro)
- 24 Ilona Koutny, Universitato Adam Mickiewicz, Poznan, pri Komparo de e-o kaj la angla en interkultura komunikado
- 31 Semajna kunveno (antaŭ-paska sankta semajno - 4a de Aprilo Paska Dimanĉo)
- Aprilo 2010**
- 7 Semajna kunveno (post-paska semajno)
- 14 Bernard-Regis Larue kial Plutono ne plu estas planedo
- 21 Kostiantyn Demianenko pri Ukrainaj sturgoj kaj aliaj Azovaj fiŝoj
- 28 Semajna kunveno
- Majo 2010**
- 5 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci
- 12 Semajna kunveno
- 19 Semajna kunveno
- 26 Bernard-Regis Larue sur la vosto de kometoj (sekve Junio pri ĉu la ĉielo falos sur niaj kapoj)

## HÉLÈNE FALK-BRACKE PRI GRAMATIKO

Pri la vorto MEM

La vorto **mem** similas al la franca samsona vorto même, sed havas malpli vastan signif- kaj uzo-kampon. La franca 'même' estas tradukenda Esperanten laŭ tri malsamaj manieroj:

- 1) per **mem**, kiam oni insistas pri la koncernata persono aŭ afero, ekz: *Mi mem devas ĉion plenumi* = *Je dois tout faire moi-même*. La ambasadoron akceptis la reĝo mem [kaj ne iu ministro].
- 2) per **eĉ**, kiam oni insistas pri la realeco de malfacile kredebla fakto, aŭ pri ekstrema kazo, ekz: *Senkulpuloj estis batitaj, malliberigitaj, eĉ mortpafitaj* = *Des innocents ont été battus, emprisonnés, voire même fusillés*. *Même un ange ne peut contenter tout le monde* = *Eĉ anĝelo ne povas ĉiujn kontentigi*.
- 3) per **sam-**, kiam temas pri iu aŭ io ne distingebla de iu aŭ io alia, ekz: *Vous me donnerez la même boisson* = *Donu al mi la saman trinkaĵon*  
Jen ekzercu por testi vian komprenon pri tiu demando. Kompletigu la vakan lokon per **mem**, **eĉ** aŭ ĝusta formo de **sam-**!

1. Li volas **mem** decidi.
2. Ŝi ne scipovas la rusan, **eĉ** ne unu vorton.
3. La filo similas la patron: li havas **saman** nazon, **samajn** okulojn.
4. Tio estas komprenebla per si \_\_\_\_\_.
5. Ni strebas al la **sama** celo.
6. **eĉ** plej ruza vulpo en kaptilon falas.
7. **eĉ** li ne kapablas tion | **eĉ** tion li ne kapablas.
8. Mi amas lin kiel min **mem**.
9. **eĉ** se ni volus nun halti, ni ne povus.

Pri la vortoj PLI - PLU - PLUS

La vortoj **pli/plu/plus** similas al la franca kaj latina 'plus', sed havas malsamajn kaj ne konfuzendajn signif- kaj uzo-kampojn.

- 1) **pli** esprimas kvanton aŭ gradon superan al alia: *pli longigi* = *allonger*
- 2) **plu** esprimas ne-ĉeson, daŭradon en tempo au spaco: *plu daŭrigi* = *prolonger*
- 3) **plus** estas uzata por adicii: *du plus du egalas kvar*. Jen ekzercu por testi vian komprenon pri tiuj vortoj. Kompletigu la vakan lokon per **pli** aŭ **plu**!
1. Lakto estas **pli** nutra ol akvo. Akvo estas mal\_\_\_\_\_ nutra ol lakto.
2. Iru ankoraŭ unu paŝon **plu**.
3. Se vi legus **plu**, vi komprenus \_\_\_\_\_.
4. etc. = ktp. = kaj tiel **plu**.
5. Iru **pli** rapide!
6. Ne iru **pluen**!
7. Restas 10 personoj, ne **pli**.
8. Mi volas **pli** scii pri li.
9. Hodiaŭ aliĝis unu **plia** lernanto.
10. Mi petos de vi **plian** monon.
11. Li donis al ŝi mantelon, kaj **plie** monon.
12. Ĉu eblas **pluvalidigi** [=proroger] mian pasporton?
13. Li neniam **plu** faros tion.
14. Mi **plue** silentos pri tio.
15. Li **pluigis** la laboradon.



KIU? KIO? Ekzerco pri la ĝusta uzo de korelativoj  
 Eĉ spertaj esperantistoj foje konfuziĝas pri la ĝusta uzo de korelativoj, precipe de la o-kaj u-serioj. Pri tiu konfuzo kulpas ankaŭ certaj lernolibroj, kiuj asertas oni uzu ekz. la vorton 'kiu' se temas pri personoj kaj la vorton 'kio' se temas pri aferoj (aĵoj). Tio estas ĝusta **NUR** kiam korelativoj estas uzataj **absolute**:  
**Kion** vi vidas? = Que voyez-vous?/Wat ziet U?  
**Sed:** **Kiun** vi vidas? = Qui voyez-vous?/Wie ziet U?  
 Aliflanke, se substantivo estas esprimita aŭ eĉ nur subkomprenata, oni nepre uzu u-korelativon; o-korelativo estu uzata nur en kazoj tute nedefinitaj, aŭ por reprezenti tutan frazon. Kaj kompreneble, oni ĉiam atentu la ĝustan kazon!  
 Jen ekzerco jam aperinta en oktobra "Aktuala" de kelkaj jaroj antaŭe, por testi vian komprenon pri tiu demando. Kompletigu la korelativojn en la sekvantaj frazoj per la ĝusta finaĵo!

1. Kiu el la du libroj estas pli facila?
2. Ekzistas buso, kiu traveturas la tutan urbon.
3. Mi ŝancis loĝi ĉe privatulo, kio estas multe malpli kosta ol en hotelo.
4. Mi ŝancis loĝi ĉe privatulo, kion mi preferas kiam eblas.
5. Ni konatiĝis kun grupo da japanoj, kiu(j)n ni jam vidis antaŭe.
6. Ne kredu ĉion, kio estas skribita en gazetoj.
7. La hundo, kiun la knabo batis, bojis laŭte.
8. Kie estas la leteroj, kiujn mi skribis?
9. Mi vizitis mian amikon, kiu ĵus edziĝis.
10. Ne ĉi, ki li diras, estas mensogo.
11. Tiun ĉi lingvon mi jam scipovas, sed tiun alian mi nur komprenetas.
12. Kiun diskon vi volas aŭskulti?
13. Kion ludas la violonisto?
14. Kio turmentas min estas jena demando:
15. Mi revidis malnovan amikon, kiun mi multe estimas.
16. Kion vi preferus, ĉu kukon aŭ glaciaĵon?

Alia fonto de konfuzo estas la plursignifa kaj plurfunkcia franca vorto "que", tro simila al la esperanta subjunkcio "ke". Jen traduk-ekzerco por franclingvanoj:

1. Mi scias [que] ke vi estas amiko fidela.
2. La homo [que] kiun mi renkontis...
3. [Que] Kion vi deziras?
4. Pli lerta [que] ol Petro

5. Same laborema [que] kiel Paŭlo  
 Kaj jen kelkaj specife francaj frazturnoj kun "que",  
 tradukendaj laŭ la senco :  
 - Je n'ai qu'un frère      Mi havas nur unu fraton  
 - Que de monde!      Kiom da homoj!  
 - Il ne fait que rire      Li nur ridadas  
 - Que ne l'aviez-vous dit plus tôt?      Kial vi ne diris pli frue?

<http://users.belgacom.net/EBG/Ekzercetoj.html>

## AGADO DE EBG



Bernard-Regis Larue pri Saturno, 17 de Marto



Semajna kunveno sen temo, 10 Marto



Nancy, staĝo de Esperanto France Est, 5-7 Marto



Remy Sproelants aŭskultis konferencon, 4 Marto



Barbara Poterucha, 2a prelego pri Nia Sano, 3 Marto



Zebastian Kirf pri Bona Espero, 24 Februaro



Eddy Raats, 2a prelego pri Kubo, 10 Februaro



Lernantoj de Françoise Pelegrin, 10 Marto



Lernantoj de Françoise Pelegrin, 24 Februaro



Lernantoj de Françoise Pelegrin, 10 Februaro

## PROMENADOJ BELGAJ ESPERANTAJ

Dimanĉo 11 aprilo :

Tago de Flandraj Ardenoj.

Du naturpromenadoj (matene kaj posttagmeze). Eblas partopreni nur unu promenadon. Matene: naturrezervejo "Pyrenee-Tombele" en Ronse(Renaix). Posttagmeze: rezervejo "Burreken" en Zegelsem(Brakel) kunportu poknikon-kiun ni manĝos kune apud la kastelo Lilare en St-Maria-Oudenhove. Surmetu botojn aŭ fortikajn ŝuojn. Aliĝu sufiĉe frue. <piet.glorieuc@gmail.com> "

Sabato 5 junio :

Serĉpromenado tra Gento.

La temo de tiu tradicia promenado estos ĉi-jare «La rivero Leie (Lys)». Komenco inter 13h30 kaj 14h30 je la "Vredeshuis". Pliaj informoj: Grupo La Progreso. <www.esperanto.be:gent>  
 Tel:09/2301677

Hélène Falk-Bracke

## INVITO POR POLIGLOTA KUNVENO

Kara E.B.G. Esperantista Brusela Grupo, Mi volas anonci al vi ke mi partoprenos en "Polyglot meeting" kiu okazos en Bruselo sekvan mardon la 9an de februaro 2010 en kafejo Bonnefooi en "rue des Pierres 8 Steenstraat". Tia renkontiĝo celas esti kiel "aligatorejo" en esperanto-renkontiĝoj. Oni tie babilos en fremdaj lingvoj kun aliaj homoj por tiel povi praktiki siajn fremdlingvojn kaj dume amuziĝi kun aliaj lingvoŝatantoj. Mi tre ĝojus renkonti tie ankaŭ kelkajn lokajn e-istojn :). Amikinoj kaj mi estas iniciatantoj de ĝi. Ili ambaŭ ne vere parolas e-on, sed mi nun instruas al ili. La celo de la renkontiĝo ja ne estas ĉefe paroli e-on, sed aliajn fremdlingvojn, tamen estus bone montri ke vivas pliaj e-istoj ĉi tie. Vi povas trovi plian informon ĉe:

[http://www.polyglot-learn-language.com/meetings.php?post\\_id=1737&msg\\_new\\_post=1](http://www.polyglot-learn-language.com/meetings.php?post_id=1737&msg_new_post=1)  
**Amike, Nico Huurman, 02-02-2010, Financial Director AEGEE-Europe / European Students' Forum**  
Rue Nestor de Tiere 15, BE - 1030 Brussels  
+32-22460320 +32-487107387 (m) [www.aegee.org](http://www.aegee.org)  
[nico.huurman@aegee.org](mailto:nico.huurman@aegee.org); [nico.huurman@hccnet.nl](mailto:nico.huurman@hccnet.nl)



Foto de Birdino en Poliglota Kunveno

## ĈEESTO EN POLIGLOTA KUNVENO

Malgraŭ la malvarmega vetero mi ĉeestis kunvenon organizitan de Nico Huurman, junulo el Utreko, Nederlando, kiu vivas en Bruselo dum kelkaj monatoj. Mi ankaŭ estis la sola kiu ne estas juna. Grupo de simpatiaj gejunuloj el diversaj landoj. Mi rakontis angle kial mi eklernis Esperanton. Kun Nico ni interparolis preskaŭ ĉiam Esperante kaj ŝajnis al mi ke tio interesigis la gejunulojn. Kiam ni alvenis ni gluis paperon sur vesto kun nomo, kutima lingvo kaj listo de aliaj lingvoj.

Birdino (Francine Sperber) Dumviva membro de EBG

## PASPORTA SERVO 1450 ADRESOJ

La ĉi-jara adresaro de la plej fama servo de TEJO, **Pasporta Servo**, enhavas 1450 gastigantojn en 91 landoj. En la antaŭa eldono (2008) estis 1225 adresoj en 90 landoj. En la P.S. 2010 la unuan lokon okupas Francio kun 177 gastigantoj. La dua estas Germanio kun 117. En Brazilo estas 84 gastigantoj. Aliaj landoj kun multaj adresoj estas Rusio (81), Pollando (75), Ukrainio (65), Usono (63), Hungario (53), Japanio, Nederlando, Ĉinio kaj Senegalio (po 36), kaj Irano (34). En la 208-paĝa poŝlibro troviĝas, krom la adresoj k.a. informoj pri la gastigantoj, ankaŭ mapoj kun indikoj pri lokoj kun gastigantoj. Enestas ankaŭ reguloj kaj konsiloj pri la uzo de la servo, kaj utilaj adresoj. La ideo pri **Pasporta Servo**, tiam sub la nomo Programo Pasporto, estis prezentita de la argentinano Ruben Feldman González en 1966. La unua adresaro laŭ la nuna sistemo, kun 40 gastigantoj, aperis en 1974 sub la gvido de Jeanne-Marie Cash el Francio. Ambaŭ pioniroj estas gastigantoj ankaŭ en la nuna eldono.

En 2009, **Pasporta Servo** fariĝis ankaŭ socia retejo, [www.pasportaservo.org](http://www.pasportaservo.org), kie kaj gastoj kaj gastigantoj povas membriĝi kaj kontakti unu la alian. La retpaĝo ne anstataŭas la adreslibron sed ofertas novajn servojn, haveblajn nur per Interreto: zomebla monda mapo, serĉilo, forumo por peti informojn pri vojaĝo, kaj blogejo por rakonti pri siaj vojaĝoj. La retpaĝo nun havas pli ol 1200 uzantojn, el kiuj ĉirkaŭ 700 estas gastigantoj. La adresaro estas aĉetebla ĉe la libroservo de UEA. La prezo estas 9 Eŭro plus afranko (plus imposto de 6% en EU). Ekde 3 ekzempleroj oni ricevas trionan rabaton.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

5

6

## NOVA UEA

Mark Fettes volas krei novan gvidorganon por UEA. Tradicio estas kaj la ĉefa forto kaj la ĉefa malforto de UEA, opinias **Mark**



**Fettes**, kiu kandidatas por la posteno de B-komitato, kaj kaze de elekto pretas konsideri postenon ankaŭ en la venonta estraro de la asocio. La komitato en sia nuna formo ne povas aktive influi la direkton de UEA, li opinias. "Ĝi estas tro granda, ĝiaj anoj estas tro hazarde elektitaj, ilin kunligas maltro da komunaj ideoj, kaj la komunikado lamas", li konstatas. Por korekti la situacion, necesus laŭ li krei novan gvidorganon, pli vastan ol la estraro, sed pli celorientitan kaj laborkapablan ol la nuna komitato. Similajn problemojn li vidas ankaŭ en la funkciado de la estraro, kiun li spertis de proksime kaj kiel redaktoro de la revuo de UEA kaj kiel estrarano. **Libera Folio**

## E-KANIBALAJ EŬROPATRIOTOJ

**Fortan reagon** ricepis inter la membroj de Germana Esperanto-Asocio vekis la letero de Eŭropa Esperanto-Unio al la Eŭropa Komisiono, publikigita en la plej freŝa numero de Eŭropa Bulteno. Ankaŭ esperantistoj en Hispanio tuj esprimis sian konsternon kaj postulis klarigon. En sia alvoko al la oficialaj instancoj de Eŭropa Unio, EEU interalie asertas ke baldaŭ la plimulto de la loĝantaro en multaj landoj de EU konsistos el islamanoj, avertas pri la danĝero de kreskanta religia

ekstremismo, kaj proponas ke EU postulu de Turkio enkondukon de eduko pri "eŭropaj valoroj" por "prepari la turkan popolon por kompreni aliajn kiel io bona".



Eŭropa Esperanto-Unio jam pli frue kaŭzis malkontentajn reagojn, kiam ĝi klopodis ligi Esperanton kun "eŭropa identeco", koncepto laŭ EEU bezonata por fortikigi Eŭropan Union. En tiu modelo, Esperanto laŭ Zlatko Tišljar, la ĝenerala sekretario de EEU, povus iĝi la "identeca lingvo" de eŭropanoj. En artikolo publikigita en Libera Folio, li argumentis, ke neŭtrala internacia lingvo ĉiukaze ne povas ekzisti, ĉar lingvo ne estas nur komunikilo sed ankaŭ identigilo.

En la nova teksto, publikigita en Eŭropa Bulteno, EEU laŭ kritikantoj faras plian paŝon, preterirante la limojn de eŭropa naciismo kaj eŭropa patriotismo.

- Per tiu ĉi teksto, EEU efektive proponas eŭropan ŝovinismon. Jam la elirpunkto aspektas dubinde. Ĝis nun mi pensis, ke nur ekstremaj dekstroj avertas pri tio, ke jam baldaŭ pli ol duono de la loĝantoj de Germanio estos islamanoj. Evidente temas pri granda troigo, opinias Ulrich Matthias.

**En sia letero al la EU-instancoj** EEU asertas ke pro "la verŝajna demografia evoluo en EU" "jam post deko da jaroj en la landoj kun la plej granda nombro da islamanoj pli ol 50% de la loĝantaro estos islama (Belgio, Nederlando, baldaŭ poste ankaŭ Germanio, Francio kaj Britio...)". La religia aparteno de la loĝantoj de EU

estas grava, ĉar kristanismo estas la "aŭtoktona" religio de la eŭropaj landoj, kaj ĉar kristanismo estas ligita kun "eŭropaj valoroj", klarigas la letero de EEU. Por ke Turkio estonte povu aliĝi al Eŭropa Unio tial necesus, ke Turkio unue dum dek jaroj entreprenu edukadon de sia popolo pri "eŭropaj valoroj kaj konscio". Tiamaniere oni laŭ la opinio de EEU povus "prepari la turkan popolon por kompreni aliajn kiel io bona kaj por sincera toleremo".

**Ulrich Matthias** kritikas la sintenon de EEU, laŭ kiu paco, toleremo kaj respekto de aliaj estus specife "eŭropaj" valoroj.

- Mi preferas nomi ilin "universalaj". Edukado por tiaj valoroj jam ekzistas en lernejoj. EEU ŝajne volas plifortigi tion (kion ankaŭ mi deziras) kaj ligi ilin kun eŭropa patriotismo (kion mi kontraŭas). Mi preferas emfazi, laŭ instigo el la libro "Projekt Weltethos" ("Projekto Monda Etiko") de Hans Küng, ke la limo inter bono kaj malbono ne disigas religiojn aŭ kontinentojn, sed trairas ĉiun religion kaj eĉ ĉiun homon. El historia vidpunkto, kristanoj eble kaŭzis pli da teruraĵoj ol islamanoj.



Ulrich Matthias kaj Lu Wunsch-Rolshoven

**Lu Wunsch-Rolshoven** esprimis ankaŭ surprizon pri la letero de EEU al la Eŭropaj instancoj: -Mi miris, ke EEU prenis starpunkton pri la eventuala aliĝo de Turkio al EU kaj ankaŭ ke ĝi komentis pri la nombro de islamanoj kompare kun kristanoj. Ĝis nun mi ĉiam pensis, ke la neŭtralaj Esperanto-asocioj limigu sian

7  
agadon je Esperanto kaj lingvopolitiko. Eble nun estas konvena momento, ke EEU prezentu siajn celojn por la venontaj jaroj kaj siajn strategion kaj laborplanon.

En Eŭropa Esperanto-Unio membras preskaŭ ĉiuj landaj asocioj de Universala Esperanto-Asocio en Eŭropa Unio, inter tiuj ankaŭ Germana Esperanto-Asocio. Pri tio en diskutlisto de germanaj esperantistoj atentigis Dirk Bindmann:

- Sendepende ĉu iu konsentas aŭ malkonsentas pri la politikaj opinioj de la estraro de EEU, ili grave ofendas la principon de politika neŭtraleco - ne nur de EEU, sed ankaŭ de GEA kiel ĝia membro. Krome la estraro de EEU damaĝas la prestiĝon de ĉiuj eŭropaj esperantistoj, ĉar tia oficiala letero supozigas, ke la estraro de EEU parolas en la nomo de ĉiuj eŭropaj esperantistoj.

**Zlatko Tišljar**, la ĝenerala sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio, responde al kritikoj pri enkonduko de eŭropa ŝovinismo en la agadon de EEU, en la diskutlisto de EEU atentigis, ke la "aŭtoktonaj eŭropaj popoloj" havas malaltan naskokvanton, kaj komparis ilin kun kancerpacientoj kiuj ne volas kredi ke ili havas kanceron, kaj tial sendube mortos pro ĝi.



Zlatko Tišljar kaj Gary Mickle

- Kio rilatas la ŝovinismon, tio estas malnova nekompreno inter forta popolo kaj ŝovinisma popolo. Por ke iu ŝtato estu efika por siaj civitanoj, ĝi devas esti ekonomie forta kaj tio postulas ankaŭ sistemon kiel defendi sian ekonomian forton. /.../ Oni havas nur du alternativojn: aŭ tendenci al evoluigo de forta kaj patriotisma popolo kun la danĝero iam

8  
transpaŝi al ŝovinismo aŭ malfortigi vian popolon kaj lasi ĝin al la faŭko de iu pli forta. La kritikoj pri neneŭtraleco laŭ li ne validas, ĉar la teksto estis cirkulita en retpoŝtlistoj, venis nur malmultaj kritikoj, kaj tiuj estis konsideritaj en la redakto de la fina teksto.

- Tiuj kiuj nun volas verŝajne akuzi la estraron de EEU pri nedemokrateco, havis pli ol 30 tagojn por reagi. La starpunkto de la estraro estis ke gravas ke al tia grava alvoko al publika esprimo de opinioj pri la estontaj dek jaroj en EU ni devas reagi kaj atentigi pri lingva problemo, sed montri ke ni interesiĝas ne nur pri lingvoj sed ankaŭ pri aliaj gravaj aspektoj de estonta eŭropa evoluo, replikas Tišljar.

**La teorio de Zamenhof kontraŭdiras sin mem**, laŭ Zlatko Tišljar, la ĝenerala sekretario de EEU. Neŭtrala internacia lingvo ne povas ekzisti, ĉar lingvo estas ne nur komunikilo sed ankaŭ memidentigilo. Tial diversaj internaciaj lingvoj laŭ li ĉiam konkuros inter si, kaj Esperantistoj unuavice devus strebi igi Esperanton la lingvo de Eŭropa Unio: "Sekve, mi agas konscie por tio ke iam Esperanto fariĝu eŭropunia lingvo, lingvo de eŭropunia identeco, kio signifas ke ĝi detruus la klasikan Esperanto-movadon kun sia interidea teorio kaj idealismoj. Tiun ĉi duan konsekvencon mi kompreneble ne ŝatas, ĉar ankaŭ mi ĝuas ties varman komforton kaj solidaron, sed mi scias ke ne estas alia vojo por la efektiva celo de Zamenhof transformi la lingvon al granda monda lingvo kun forta internacia rolo."

**Gary Mickle**, unu el la kritikantoj de la deklaro, miras, ke gvidantoj kaj membroj de la landaj asocioj de UEA akceptas la agadon de EEU: - EEU havas kun la homoj, kiuj membras en ĝi pere de siaj landaj asocioj, duonon de la amplekso de UEA kun ĝiaj asociaj membroj, aŭ eĉ iom pli. Mi miras pri la pasiveco de tiu homamaso, kiu permesas al la EEU-estraro reprezenti ilin per tiel teme larĝa politika programo. Programo, kies prilingva parto ne estas la ĉefa elemento. Per la "eŭropa ideologio" de Tišljar, kiun

EEU nun transprenas kiel sian, Esperanto malligiĝas de universalismaj valoroj kaj ligiĝas kun partikularismaj. EEU per tiu ĉi deklaro anstataŭigas tion, kion multaj ĝis nun nomis la "interna ideo" de Esperanto, per io nova kaj bedaŭrinde naciisma.

Laŭ li, EEU tiel enrubujigas la ideon pri Esperanto kiel demokratia komunikilo, kaj anstataŭe proponas ĝin kiel elitmanipulilon por enkapigi al popolamasoj identecon, kiun la elitoj opinias taŭga. La propono de EEU siavice trafos la rubujon de la EU-instancoj, supozas Gary Mickle, sed laŭ li ekzistas la risko, ke ĝi gajnos terenon inter la esperantistoj mem.

- EEU per sia bulteno kaj sia kongreso estas influa grupo inter la esperantistoj mem, kaj la danĝero ekzistas, ke kelkaj el ili ekkredos, ke la "eŭropa ideologio" estas la lasta ŝanĉeto por la venko de Esperanto, kaj sekve pli kaj pli uzos la argumentojn, kiujn EEU tiom rekomendas, en la publika informado.

Libera Folio

### MALFERMA TAGO-17AN DE APRILO

Mark Fettes estos la ĉefa preleganto de la 32-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 17-an de aprilo de la 10-a ĝis la 17-a horo. En sia prelego Fettes traktos Esperanton kaj la mondan edukan problemon. Laŭ li, tradicie ni pensas pri Esperanto kiel respondo al lingva problemo. "Tamen, eblas koncepti ĝin egale bone kiel respondon al eduka problemo. Kia estas tiu problem(ar)o, nuntempe, kaj kiel ni povas respondi al ĝi, estas la ĉefaj temoj de la prelego. Ne mankos kelkaj konsideroj pri la eduka rolo de UEA kaj la sekvoj por ĝia strategio", klarigas la prelegonto.

Mark Fettes estas asista profesoro en la Fakultato pri Edukado de la Universitato Simon Fraser en Vankuvero, kie okazis Vintra Olimpiko 2010. Li estis redaktoro de la revuo "Esperanto" 1986-1991 kaj estrarano de UEA 1992-1998. En 1996 li estis la ĉefa aŭtoro de la fama Manifesto de Prago, kiun subskribis pli ol 14000 esperantistoj.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

## BARELO LITOVA

Ekde oktobro 2008 Antanas Grincevicius, esperantisto el la litovia ĉefurbo Vilnius, iniciatis tiel nomatan "blogon" pri interesaj kaj aktualaj eventoj en Litovio. Esperanto-temoj tie ankaŭ ne estas fremdaj. Efektive, tiu "blogon" estas altnivela retgazeto pri Litovio kun la titolo "Barelo". "Barelo" estas imitinda ekzemplo de praktika utiligo de Esperanto. Ŝajnas, ke ĝi estas unika en la mondo. Apenaŭ ekzistas io simila en aliaj landoj. La retgazeto estas profesie farita. Ĉiu artikolo (blogero) estas bele kaj trafte ilustrita. En la retgazeto eblas legi interesajn kaj aktualajn artikolojn pri historio, kulturo, naturo, arto, ekologio, ekonomiko, politiko, energetiko, festoj, folkloro, fotografio, lingvo, literaturo, muziko, scienco, sporto k.s. de Litovio -- entute estas 51 ŝlosilvortoj, el ili 5 estas Esperanto-rilataj. Ĉiuj artikoloj estas verkitaj de la aŭtoro en bona Esperanto. Estas bona ekvilibro de diversaj temoj. Do, la retgazeto ne estas pri Esperanto, sed simile kiel la revuoj "Monato" aŭ "Kontakto" pri diversaj temoj en Esperanto. Ekde la lanĉo de la retgazeto la 10-an de oktobro 2008 ĝis hodiaŭ (la 28an de februaro 2010) en ĝi estas publikigitaj 87 artikoloj, el ili 13 estas ligitaj kun Esperanto. La retgazeto havas ligojn al aliaj retejoj pri fotoj, tradukado, lingvaj problemoj, diversaj TTT-ejoj, esperantistoj, literaturo, tekstoj, gazetararo, E-radioj k.s. La retgazeto meritas multe pli da atento ol ĝi havis ĝis nun, ĉar pro la modesteco de la aŭtoro ĝi ne estis sufiĉe reklamita. La slogano de la retgazeto estas: "Por eldiri la opinion ne serĉu barelon sur bazara placo...". La retadreso de la redaktoro de "Barelo": [grinanta@gmail.com](mailto:grinanta@gmail.com) . Legebla ĉe <http://barelo.blogspot.com/> .

Povilas Jegorovas,

Elstara esperantisto, prezidanto de Litova Esperanto Asocio

## ESPERANTAJ EVENTOJ



26/6 - 4/7



10

## NOVELETO 11

Muhammado bin 'Abdi-l-Maliki-l-Hamdanijo skribis en sia « Historio », ke 'Adudo ad-Daŭlato estis informita, ke kurda bandaĉo, kiu kaŝloĝas ĉe krutaj montoj, tiel, ke nenio poveblas kontraŭ ili, priabadas en la vojoj. Li kunvokis unu el la tieaj komercistoj kaj provizis lin per mulo portanta du skatolojn, ene de kiuj kuŝas dolĉaĵoj difektitaj per veneno, abunde parfumitaj kaj envolvitaj en luksa pakumo. Li donis al li dinarojn, kaj ordonis, ke li aliĝu al la karavano kaj pretendu, ke tiu donaco estas destinita per certa virino de unu el la guberniestroj de landlimaj regionoj. Tiele faris la komercisto kaj ekiris kape de la karavano. Nu, eksobirinte, la fiuloj sturmis ĝin kaj kaptis la pakaĵojn kaj la komercaĵojn, lasante la vojaĝantojn senprovizigitaj. Unu el la sturmantoj disigis la mulon kaj marŝigis ĝin kun li returne monten. Kiam li malfermis la skatolojn, li ekvidis la dolĉaĵojn, kies parfumo ekeliĝis. Li trovis fascinanta ilian aspekton kaj ravajn iliajn odorojn. Li ekkomprenis, ke li ne povas rezervi al si ilin; sekve li invitis siajn kunulojn. Ili vidis kion neniam antaŭe estis vidintaj, kaj pro tio, ke ili malsatis, ili haste elmanĝis la frandaĵojn. Tuj poste ili renversiĝis kaj mortis fino al la lasta. [Informite pri tiaĵo,] la komercistoj urĝis sin repreni siajn pakaĵojn kaj varojn, kaj siajn armilojn, kiujn ili totale reprenis. Mi neniam antaŭe aŭdis pri pli miriga insido ol tia, kiu elsarkis la spurojn de la arogantoj kaj la forton de la koruptantoj.

## NOVELETO 12

Estis raportite al mi, koncerne 'Adudo ad-Daŭlato, ke estis turka junulo inter liaj militaj guberniestroj. Ĉi tiu staradis antaŭ luko, rigardante fikse virinon malantaŭ ĝi. La virino diris al sia edzo: « Tiu turko malpermesas al mi rigardi malantaŭ mia luko elen. Dum la tuta tago li rigardas en la direkto al ĝi, eĉ kiam neniu staras meze de ĝi. La homoj jam apenaŭ ne suspektas, ke mi kaj li amindumas unu la

alian. Mi ne scias kion mi povas fari. » Ŝia maljuna edzo diris: « Skribu al li bileton en kiu vi diros: 'Estas sencesce, ke vi staradu tie; prefere, venu vidi min post 'Iŝa, kiam la homoj malatentas ĉe la mallumo; mi restos malantaŭ la pordo.' » ('Iŝa estas post-krepuska preĝo, kvina diurna preĝo de la islamanoj; samvalora kiel la oka diurna preĝo, kompletorio, ĉe la katolikaj monaĥejoj). Poste, la edzo iris fosi profundan laŭlongan truon malantaŭ la pordo kaj gvertis lin. Kiam la turko alvenis, li malfermis al li la pordon, kaj ĵus kiam li eniris li ekpuŝis lin en la truon kaj tuj entombigis lin. Kaj pasis multaj tagoj sen tio, ke oni sciu ajnon koncerne lian sorton. 'Adudo ad-Daŭlato informiĝis pri li. Oni diris al li: "Ni ne havas novaĵojn pri li." Sed liaj meningoj ne ĉesis varmiĝi kaj fine li kunvokis la muazinon (*muezino-n estas ofica kriisto kiu de supre de manarato [minareto] anoncas la preĝhorojn kaj al ili alvokas*) de la masĝido [moskeo] najbara al tiu domo kaj severe kaj publike skoldis lin, aldirante: « Jen cent dinaroj. Prenu ilin, kaj observu kion mi tuj ordonos al vi: kiam vi estos reveninta vian masĝidon, alvoku al la ĉi-nokta preĝo kaj restu en la masĝido. Kaj sciigu min pri la unua persono, kiu eniros renkonte al vi kaj informiĝos pri la kialo de tio, ke mi kunvokis vin. » Li diris: « Jes. » Kaj li tiel faris. Nu, la unua persono estis la maljuna edzo. Enirinte, li diris al li: « Mi estas tutkore via. Kion volis de vi 'Adudo ad-Daŭlato? » Li respondis: « Li volis nenion de mi, kaj ĉio tute glatas. » Kiam mateniĝis, li sciigis al 'Adudo ad-Daŭlato la novaĵon. Tiam li sendis alkonduki al li la maljunulon kaj diris al li: « Kion faris la turko? » Li respondis: « Mi diros al vi la veron. Mi havas virinon deteniĝeman kaj estimandan, kaj li staradis sub ŝia luko por ŝin observi. Si plendis, el timo, ke lia starado kaŭzu skandalon. Do, mi faris al li tia-tian. » Li diris: « Iru en la favoro de Allaho. La homoj ne aŭdis [vin konfesi ajnon al mi], kaj [ni ŝajnu kvazaŭ] mi ne pridemandis vin. » Jacob Hasbun elarabigis

## AŬTUNAJ MEDITOJ

En la eternaj ombraj noktoj miaj,  
grandiĝas mia trista nostalgio;  
kaj dissolviĝas, kiel sunradio,  
mia animo en sonĝletargiaj.

Pasis la horoj de l' noktoj pasiaj,  
kaj nur esti sola kun mia mio,  
ĉu estos mia nura ambicio  
sen aliaj stimuloj emociaj?

Ne!, ankaŭ ĉi sufersonĝa turmento  
pasos serĉante edenon destinon  
tra l' somnolo-mallumeco-silento;

mia konscienco trapasos l' finon  
de la nokto, kiel uraganvento,  
por alveni, Regi, en vian sinon.

Alberto Garcia Orive, 2009, Bilbao, Hispanujo

## Mia Vivo

AMI estas vivi,  
AMI estas ridi,  
AMI estas suferi  
kun la sufero de aliaj.  
AMI estas ĝojiĝi  
kun ĝojo de aliulo;  
AMI estas doni sin  
kaj peti nenion;  
Ami estas senti  
la sentado de alia ;  
AMI estas ĝojiĝi  
kun la ĉeesto de aliulo  
aŭ plori la foresto  
de tiu kiun ni amas;  
AMI estas angoro,  
AMI estas malĝojo,  
AMI estas poezio,  
AMI estas posedi,  
AMI estas malgajni,  
AMI estas vivi la vivon.

Raymundo Souza, Brazilo

## GENT - RUANDO

Plena tago pasas, kvazaŭ momento.  
Dank' al mia ĉarma invitintino  
du momentojn mi pasigis en Gento.  
Gento estas la fabel' ! Punkto-fino.

En strateto olda, preskaŭ fikcia,  
en la temp', volvita kvazaŭ rubando,  
nin surprizis ŝildo ekspozicia  
stranga tie ĉi - pri l' art' de Ruando..

Do, sen kredi la afiŝan alvokon,  
malkongrue provokantan angorojn,  
ni decidis enrigardi ĉi lokon  
por momento. Tiu daŭris tri horojn.

Sur la muroj de salonoj senbrujaj  
realiĝis kun infana naivo  
fulge nigraj, ruĝaj, brunaj, helbluaj  
speguliĝoj de pensado kaj vivo,

aĝa pli ol la fabel' mezepoka,  
nekutima, akceptata senkrede,  
tamen bunta, animŝira, alvoka  
por mergiĝi kaj memori herede.

Jen kvadrato, rombe, ronde, spirale,  
kvazaŭsimple sed kun forto elana  
fremda art' atakis nin akvofale  
kaj ekzorce, kiel sorĉo pagana,

flumiganta la animon impulse,  
ebriige, tentoplene frapanta...  
Estus mi ja dikhaŭtul', ŝtipkapul', se  
mi ĉi tie ne stuporus gapanta.

Plena tago pasas, kvazaŭ momento,  
do, bonŝance por la vaga destino,  
la momento de Afrik' ornamenta  
estis mia sorĉa sonĝ'. Punkto-fino.

Gent, 26.11.2004,

Miŝa Bronŝtejn, Tiĥvin, S.Petroburgo, Rusujo

## SIMBOLO: LA STELO KAJ LA FLAGO

La internacilingva movado estiĝis en la  
1880-aj jaroj. La koloro de ĝiaj simboloj  
estis determinita de la *eŭropa kolor-  
simboliko* de la 19-a jc., en kiu la espero  
estis verda. Laŭ klarigo kiun ricevis jam  
lernantoj de Volapuko: *unu el la koloroj de  
la "volapuka blazono...estas verda, ĉar ĝi  
esperas alporti por la homaro la plej  
grandan benon."*

Post la kolapso de la Volapuk-movado la  
e-istoj portas plu tiun simbolon, jam  
dekomence kun troigoj, pri kio atestas  
konsilo el *La Esperantisto* en 1893: "S-ro  
L. de Beaufront konsilas, ke la kovriloj de  
ĉiuj libroj de nia literaturo kaj entute ĉio,  
kiu tuŝas nian aferon, havu verdan  
koloron kaj portu supre stelon." Sed  
komence almenaŭ la stelo estis  
diverskolora (pro la verda fono). Plej ofte  
aperis kvinpinta *ora stelo*. La oran stelon  
oni verdigis probable en 1904. La Bulonja  
Grupo E-ista inventis kiel verdigi ankaŭ la  
surflagan stelon: en la supra, maldekstra  
angulo en blanka kvadrato estu verda  
stelo! Unu jaron poste ankaŭ la unua  
Universala Kongreso akceptis tiun  
iniciaton, kaj ekde tiam la flago de la  
movado estis la verda flago kun verda  
stelo.

La idistoj decidis ke la Ido-flago estu blua,  
en la mezo kun Ido-insigno, t.e. sespinta  
blanka stelo, kaj ĉirkaŭ ĝi la surskribo:  
Linguo Internaciona Ido. Pli malfrue en la  
stelo aperis la vorto IDO, en blanka rando  
de la insigno la teksto: Linguo  
Internaciona di la Delegitaro.[Hodiaŭ  
*Progreso*, la jartriona revuo de "Uniono  
por la linguo internacia (Ido)", portas iom  
modifitan insignon (vd. bildon). - Red.] En  
la jardeko de la grandaj bataloj inter idistoj  
kaj e-istoj la "fideleco" al la verda, resp. al  
la blua flago estis tre grava. En Esperantio  
disvastiĝis ia kulto de verdaĵoj, kelkfoje  
atingante la signojn de manio.

La kolorpsikologiaj esploroj en la 70-aj  
jaroj pruvis ke por granda plimulto de la  
homoj (en ĉiu aĝo kaj sekso) *la plej  
simpatiaj, plej allogaj koloroj estas la*

*oranĝa, ruĝa kaj blua.* Alia grava regulo,  
kiun oni starigis por la reklamado: *ĉiu  
ronda aĝo estas pli simpatia, pli alloga, ol  
io pinta, akra.* (Pri tio vidu en Esperanto:  
*Manlibro de varbado*, Günter Conrad,  
München, 1974 kaj 1977.)  
Eĉ sen tio jam amasiĝis la problemoj  
ĉirkaŭ la verda flago. La verdaj koloro kaj  
flago jam de longe estis konataj kiel tiuj *de  
la profeto, de Islamo*, kaj ekde la sepdekaj  
kiel tiuj de la ekologiaj movadoj (*verduloj*).  
Rilate la simbolikon de la Internacia  
Lingvo multaj pli kaj pli sentis la neceson  
de radikala ŝanĝo, sed ĝis 1986 la  
movado esence ne povis liberiĝi de la jam  
tre ĝenaj tradicioj. Nur tiam aperis en la  
movado nova simbolo de Hilmas Ilton S.  
Ferreira el Itabuna (Brazilo), kiam la  
movado estis matura por akcepti kaj ekuzi  
ĝin. UEA elektis en 1983 la simbolon nur  
por la Jubilea Jaro, sed ĝia venkiro jam ne  
estis direktebla.

En 1986 Flandra E-Ligo faris la unuan  
firman paŝon antaŭen por *renovigi la  
bildon pri Esperanto*, fuŝitan de la  
diletanta propagando de "verduloj". FEL la  
unua forlasis la verdan stelon kaj  
enkondukis la normalan uzon de la jubilea  
simbolo sur ĉiuj informaj materialoj kaj  
objektoj. (Vd. I. Durwael: "Kiel rekrei la  
bildon de Esperanto?", *Esperanto*, 1991  
jan., p.7.) Ĝian ekzemplon sekvis pli kaj  
pli da asocioj, gazetoj, eldonejoj kaj  
privatuloj.

Sed la simbolo por la plimulto de la  
movadanoj *ne estas racia, sed emocia  
afero, ligita al tradicioj*. Tiujn oni ne povas  
transpasi de unu jaro al alia. Tamen la  
*elasteco de la identa grafika bildo* ebligas  
ankaŭ ĝian kombinon kun verda stelo. Se  
oni ĝuste elektas la kolorojn, per tiu  
malnova elemento la bildo povas esti pli  
bunta kaj pli plaĉa.

*La venkiro de Esperanto-simbolo  
determinis la sorton de la tradicia flago.*  
Ĉu eble ekardos la diskutoj kaj fermos ilin  
apero de iu surprize nova, originala flago  
kun la simbolo de Esperanto?

Árpád RÁTKAI, Hungarujo

## LONGA KOLEGO

En 2008 aperis monumenta verko de Geoffrey Sutton pri la literaturo de Esperanto (*vidu apuda bildo*). Ĝi estas la ĝis nun plej ampleksa monografio pri la vasta temo, kaj iom mirinde, ĝi estas anglalingva. Kelkaj esperantistoj jam proponis, ke oni traduku la verkon "Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto" al Esperanto, sed kompreneble la anglalingva versio povas atingi multe pli grandan publikon, kiu ĝis nun tute ne konsciis pri la ekzisto de esperantlingva literaturo. Plian paŝon direkte al sia potenciala publiko la elstara verko faris la 6-an de februaro, kiam en la pinte prestiĝa literatura revuo Times Literary Supplement aperis ampleksa recenzo de John Wells. Libera Folio publikigas la kompletan tekston de la recenzo. La traduko estas farita de Brian Moon kaj aprobita de John Wells.



Geoffrey Sutton: Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto, 740 p. Libroservo de UEA: 48 eŭr.

En la jaro 1887 Ludovik Zamenhof, juda okulkuracisto preskaŭ tridekjara kiu laboris en tio, kio estas nun Pollando sed apartenis tiam al la Rusa Imperio, estis edziĝonta. Laŭ la tiama kutimo lia estonta edzino alportis konsiderindan doton. Kun ŝia konsento sed je la konsterniĝo de la estonta bopatro, la kuracisto elspezis tiun doton por presigi kaj eldoni lingvoprojekton, pri kiu li laboradis ekde siaj adoleskaj jaroj. La libreton, post la necesa aprobo de la caraj cenzuristoj, oni eldonis komence ruslingve sub la titolo *Mejdnarodnij Jazik* (Internacia lingvo). Antaŭ la fino de tiu jaro ĝi aperis ankaŭ en la pola, la germana kaj la franca. La sekvan jaron aperis anglalingva versio. El la projekto evoluis tio, kion ni nun konas sub la nomo Esperanto (tiu nomo estis origine la plumnomo de la aŭtoro – "tiu, kiu esperas" – sed tre baldaŭ ĝi aplikigis anstataŭe al la nova lingvo mem).

13  
Zamenhof ĝisvivis tion, ke lia teoria plano ekflugis kiel vera lingvo, kiun oni praktikis komence en orienta Eŭropo, poste en Francio kaj okcidenta Eŭropo kaj fine tutmonde. Post malpli ol dudek jaroj internaciaj kongresoj okazantaj komplete en la lingvo Esperanto kunvenigis milojn da partoprenantoj – kaj tio iĝis tradicio, kiu daŭras ankoraŭ nun.



John Christopher Wells, naskiĝis la 11a de marto 1939, en Bootle, Merseyside, Anglujo, fonetikisto emeritiĝita en 2006 de la University College London

Laŭ la nuntempe populara percepto pri Esperanto, temas pri nobla malsukceso. Ĝi ne sukcesis atingi la celon de sia fondinto, ke ĝi iĝu dua lingvo por la tuta homaro. Ĝi ne sukcesis neŭtraligi la historiajn rivalecojn kaj malamojn de la homaro rilate al lingvoj. Plej multaj homoj – se ili entute pensas pri Esperanto – ne konsideras ĝin serioza lingvo, aŭ entute lingvo en la vera senco.

El socilingvistika vidpunkto tamen eblas aserti, ke Esperanto estas unika kaj rimarkinda fenomeno. Ĝi estas la sola okazo en la historio de la homaro, kiam io komencita kiel surpapera projekto iel transformiĝis al lingvo, kiun homoj povas flue paroli kaj efektive flue praktikas, en kiu ili sociumas, prelegas kaj eĉ kreskigas familiojn.

Krom la dekoj aŭ centoj da miloj da nuntempaj uzantoj de Esperanto, kiuj lernis ĝin en adoleska aŭ plenkreska aĝo,

14  
laŭ taksoj ekzistas iel inter 200 kaj 2.000 vere denaskaj parolantoj, kiuj parolas la lingvon – normale en dulingva aŭ trilingva situacio – ekde plej frua infaneco, ĉar ili elkreskis en Esperanto-parolantaj familioj (mi persone konas almenaŭ dek tiajn kazojn, inkluzive de tria-generaciaj parolantoj).

Esperanto ĉiam ligiĝis kun pli vastaj idealoj de paco kaj frateco. Ĝiaj uzantoj ofte sukcesis realigi je privata nivelo tion, kion laŭ iliaj deziroj la registaroj devus realigi je nacia kaj internacia niveloj. En la politika mondo Esperanto havas ankaŭ siajn martirojn, ekzekutitajn – precipe sub Hitler kaj Stalin sed ankaŭ sub Maŭ – pro siaj internaciaj kontaktoj kaj pro subteno al idealoj neakcepteblaj por totalismaj reĝimoj.

La kresko de la angla kiel internacia lingvo, kaj ankaŭ la daŭra uzado de aliaj "lingvoj de vasta kontakto", kiaj la hispana, la franca, la portugala, la rusa, la araba kaj la ĉina, ĉiu en la propra influfero, signifas ke la perspektivo pri la ĝenerala alpreno de Esperanto kiel la preferata lingvo de internaciaj kontaktoj aspektas sufiĉe malhela. Malgraŭ tio ekzistas kaj pluvivas konsiderinda kvanto da parolantoj (laŭ asertoj de subtenantoj temas pri milionoj, sed pli realisme eblas taksu la parolantaron je 100.000), kiuj ne nur uzas la lingvon sed aĉetas kaj legas librojn verkitajn en ĝi, aŭ nuntempe faras ekvivalente en la reto.

Unu kritiko ofte esprimata kontraŭ Esperanto estas, ke ĝi havas nenian kulturon, nenian literaturon. La 728-paĝa enciklopedio de Geoffrey Sutton multon kontribuas al refutado de tiaj ideoj. Ĝi ofertas unuopajn artikolojn pri proksimume 300 aŭtoroj kaj ties verkoj. La dismeto laŭ Sutton de la literatura historio de Esperanto en kvin ĉefajn periodojn ŝajnas pli-malpli ĝusta.

La unua periodo, kiun Sutton nomas "Primitiva romantikismo kaj la estigado de stilo", estis tempo de naiva entuziasmo. Zamenhof mem laboris plejparte pri tradukado de verkoj de famaj aŭtoroj (Molière, Goethe, Schiller, Gogol, Andersen, Shakespeare, kaj precipe la *Malnova Testamento* – sed ne, kiel asertas Sutton, la Nova) kun la celo starigi la literaturajn eblojn de la nova lingvo fronte al tiutempaj sciencaj teorioj pri la supozataj limoj de la funkciado kaj esprimkapablo de tiel nomata artefarita lingvo. En la momento de lia morto en 1917, ankaŭ liaj adeptoj estis produktintaj poezion kaj prozaĵojn iom atentindajn.

La jaroj inter la Unua kaj la Dua Mondmilitoj estis la periodo, kiam krea verkado en Esperanto vere ekfloris. En la dua periodo laŭ Sutton, "Matura romantikismo kaj literatura florado" (1921-30), aperis generacio de poetoj, precipe la hungaroj Kalocsay kaj Baghy, la ruso Miĥalski kaj la japano Kenji Ossaka. Ili ekspluatis la latentajn eblojn de la lingvo, evoluigante vortludojn, vortformojn kaj vortordon laŭ manieroj, kiuj siatempe iomete ŝokis sed estas nun senprobleme akceptataj. La tria periodo, "Parnasismo kaj plenmaturiĝo" (1931-51), konstruis sur tiu fundamento kaj firmigis la pozicion de Kalocsay kiel la plej kapabla esperantlingva poeto de la unua parto de la 20-a jarcento.

Dum Kalocsay plaĉis al legantoj kun emo al serioza literaturo, la verkisto kiu plej ravis la ĝeneralan Esperanto-uzantan publikon estis Raymond Schwartz, bankoficisto el Alzaco kun gepatroj franclingvaj sed edukado germanlingva. Li estis la majstro de la esperantlingva kalemburo.

Malgraŭ la deziro de Zamenhof, ke oni evitu homonimojn, la karakteriza sistemo de aglutinaj afiksoj, kiu rezultigas






Inter la mano kaj la buŝo ofte disversiĝas la supo.  
 Inter miaj muroj estu miaj plezuroj.  
 Ĵeti bastonon en la radon.  
 Ĵeti perlojn antaŭ la porkojn.  
 Ju cerbo pli prudenta, des lango pli silenta.  
 Ju laboro pli publika, des pli granda la kritiko.  
 Ju pli da havo, des pli da pravdo.  
 Ju pli da ĵuroj, des pli da suspekto.  
 Ju pli oni posedas, des pli oni avidas.  
 Kalkuli muŝojn.  
 Kamparo petas pluvon, urbo sunon, Dio hezitas.  
 Kandelero ne povas dispeli mallumon de ĉagrenoj.  
 Kapo pekas, piedoj suferas.  
 Kaprica fianĉino restas eterne fraŭlino.  
 Karesi kontraŭ la haroj.  
 Kia ago, tia pago. Kia vivo tia morto.  
 Kia demando, tia respondo.  
 Kia kapo, tia ĉapo.  
 Kia patrino, tia filino.  
 Kia sufloro, tia aktoro.  
 Kia vivo, tia morto.  
 Kiam nokto vualas, ĉiuj koloroj egalas.  
 Kie ajn semita, grajno finfine iras sub muelŝtonon.  
 Kie diablo ne povas, tien virinon li ŝovas.  
 Kie fumo leviĝas, tie fajro troviĝas.  
 Kie lumo ekzistas, ankaŭ ombro troviĝas.  
 Kiel akirite, tiel perditte.  
 Kiel ĉevala hufo, espero eblas fendiĝi survoje.  
 Kien kudrilo iras, tien fadenon ĝi tiras.  
 Kiom da homoj, tiom da gustoj.  
 Kiom da kapoj, tiom da opinioj.  
 Kion ajn vi aŭdas, metu en la anguleton de ebleco.  
 Kion koro portas, vizaĝo raportas.  
 Kion rajtas leono, ne rajtas azeno.  
 Kiu ambicias sin drako devas gluti serpentojn.  
 Kiu bredas abelojn havas mielon.  
 Kiu demandas, tiu ne eraras.  
 Kiu edziĝas virino pro riĉaĵo jam faris negocon.  
 Kiu kaĉon aranĝas, tiu ĝin manĝas.  
 Kiu kreskis ĉirkaŭ strek-amaso ĉiam sopiras al ĝi.  
 Kiu multe parolas, ne multe faras.  
 Kiu ne lernadas hodiaŭ, nescios morgaŭ.  
 Kiu ne petas, tiu ne ricevas.  
 Kiu ne povas danci diras ke planko malebenas.  
 Kiu ne riskas, tiu ne gajnas.  
 Kiu povas agas; kiu ne povas preĝas.  
 Kiu ridis eliranta ploros revenanta.  
 Kiu ŝatas moneron ne ŝatas veron.  
 Kiu sin enjungiĝas devas tiri.  
 Kiu tro certas pri sia vero kreas inferon sur la tero.  
 Kiu vidas ĉielon en akvo, vidas fiŝojn en arboj.  
 Koko krias fiere, sed ne danĝere.  
 Konsilo publika estas kritiko, privata estas instruo.  
 Krono ne sanigas kapdoloron.  
 Kuirado estas la arto atenti ke enhavo ne bruliĝu.  
 Kun kiu vi festas, tia vi estas.  
 Kutimo estas nia dua naturo.  
 La kuracado por ĉiuj malsanoj estas tempo.  
 La malvero estas aŭdi, la vero estas vidi.  
 La mortinto estas la plej kara ano de la familio.


La okuloj estas pesiloj de pensado.  
 La plej ruza mensogo - ne fidinda apogo.  
 La sama afero, sed kun la kapo al tero.  
 La tempo ĉiam malkaŝas la veron.  
 La tuj de sinjoroj estas multe da horoj.  
 Laboro farita, ripozo merita.  
 Laŭ la frukto oni arbon ekkonas.  
 Laŭdu tagon nur vespere.  
 Leciono al profesoro estas vana laboro.  
 Lernado era, era, era : kaj vi iam estos klera.  
 Lernado sen fruktoj ne estas.  
 Li estas kompetenta, kiel besto pro arĝento.  
 Li havas la kapon fortike sur la kolo.  
 Li komprenas predikon, kiel bovo muzikon.  
 Li neniam venkis la alfabeton.  
 Longa vojaĝo komenciĝas per unu paŝo.  
 Ludu kandelon ne valoras.  
 Malantaŭ barilo kuraĝo estas facila.  
 Malavarulo kaj porko estas bonaj post morto.  
 Malbonŝanca muso vidis fromaĝon, ne katon.  
 Malfeliĉo venas rajde, foriras piede.  
 Malgranda truo povas droniĝi grandan ŝipon.  
 Malplena sako ne staras rekte.  
 Malpli da havo, malpli da zorgoj.  
 Malsaĝulo ĉie sian nomon skribas.  
 Malsato turmentas, lupu timon ne sentas.  
 Mankas klapo en lia kapo.  
 Martelu akvon, ĝi restas akvo.  
 Mastro for, laborejo ferias.  
 Matena horo estas plena da oro.  
 Matura frukto falas sed ne nepre en vian buŝon.  
 Mensogo ne piediras sed skandalo eĉ flugas.  
 Mi nek panon esperis, subite kuko aperis.  
 Mont' al monto ne venos, sed homo homon renkontos.  
 Naskiĝu, edziĝu, kaj mortu, ĉiam monon alportu.  
 Naskite ronda, oni ne mortos kvadrata.  
 Ne ĉiam per aĝo mezuriĝas la saĝo.  
 Ne ĉio brilanta estas diamanto.  
 Ne diru „hop“ antaŭ la salto.  
 Ne donu kokonon por supo, se ĝi havas oran ovon.  
 Ne eblas marŝi al steloj kun ŝtono en la ŝuo.  
 Ne ekzistas fumo sen fajro.  
 Ne ekzistas regulo sen escepto.  
 Ne el ĉiu ligno oni faras violonon.  
 Ne elvoku lupon el la arbaro.  
 Ne falas frukto malproksime de l' arbo.  
 Ne gutas mielo el la ĉielo.  
 Ne juneco sen kaprico nek maljuneco sen malico.  
 Ne kredu al parolo sen propra kontrolo.  
 Ne laciĝos mano, ne fariĝos pano.  
 Ne prediku knabino al sia patrino.  
 Ne sanktuloj potojn faras.  
 Ne ŝovu la nazon en fremdan vazon.  
 Ne venos mont' al monto, sed homo homon renkontos.  
 Nenia peketo restas longe sekreto.  
 Nenia ago fariĝas sen pago.  
 Neniu kamelo scias per kiu ŝtono ĝi stumblos.  
 Neniu estas profeto en sia urbe.  
 Neniu frapas feron por nenio.  
 Neniu sanktulo estas sen makulo.

Neniu scias kio morgaŭ lin trafos.  
 Ni amu nin frate sed kalkulu akurate.  
 Nur la mulo malkonfesas sian patron.  
 Nur ostoj faras bruon en la telero.  
 Okazas ke foresto de problemo estas problemo.  
 Okazo faras ŝteliston.  
 Oni faris, oni ĉesis, kaj ĉion forgesis.  
 Oni ligas azenon per piedo, homon per lango.  
 Oni ne lernas malvirtojn en lernejo.  
 Oni ne povas esti klerulo per leko de inko.  
 Ovo kokonon ne instruas.  
 Pagas maljunaj jaroj por junaj eraroj.  
 Pano estas alportita, korbo estu forĵetita.  
 Pastro vivas de preĝoj, advokato de leĝoj.  
 Pekas junuloj kaj pekas maljunuloj.  
 Pensoj iras trans limo sen pago kaj sen timo.  
 Per bonaĵo intencoj estas pavumita la infero.  
 Per vorto ĝentila ĉio estas facila.  
 Plej bona gvidilo estas la lango.  
 Plej bona lernado estas ripetado.  
 Plej bone ridas, kiu laste ridas.  
 Pli bona estas io, ol nenio.  
 Pli bone malfrue, ol neniam.  
 Pli bone ne fari, ol erari.  
 Pli da mono, pli da zorgo.  
 Pli facile estas regi ol agi.  
 Ploranton ni evitas, ridanton ni imitas.  
 Por grandaj malbonoj, grandaj rimedoj.  
 Por morgaŭ panon ŝparu, laboron tuje faru.  
 Pordo de malriĉulo ne bezonas fermon.  
 Prefere konata diablo ol nekonata sanktulo.  
 Prokrasti malbonon estas bono.  
 Proverbo estas sperto, proverbo estas averto.  
 Proverbo estas la scio de la strato.  
 Provripeto donas sukceson ne nur al baletoj.  
 Rajdi sur ĉevalo oni ne lernas sen fali.  
 Restu tajloro ĉe via laboro.  
 Riĉa estas tiu, kiu ŝuldas al neniu.  
 Riĉeco sen gvido, kiel ĉevalo sen brido.  
 Ridis eliranta, ploros revenanta.  
 Rido matene-ploro vespere.  
 Ripetado de eraro ne faras ĝin vero.  
 Ripetado estas plej bona lernado.  
 Romo estas tie, kie estas la Papo.  
 Sanigaĵo malbongusta, efiko plej ĝusta.  
 Sata malsatan ne povas kompreni.  
 Scii kiel io fariĝas estas pli facile ol ĝin fari.  
 Se amas Dio, prosperas ĉio.  
 Se ambicilo faras ponto, prenu pli longan vojon.  
 Se arbo rektas ne ploru ke luno oblikviĝas ombron.  
 Se ĉielo falus sur tero, birdokapto facila afero.  
 Se Dio ne pardonus, Paradizo restus malplena.  
 Se gut' al guto aliĝas, maro fariĝas.  
 Se iel fluĝas talpoj, ili fluĝus super alpoj.  
 Se kamelo stumpletas tuj tranĉiloj kolektiĝas apud.  
 Se kato havus flugilojn, birdoj havus malfacilojn.  
 Se malriĉulo sukcesas, li ĉiujn forgesas.  
 Se malsato turmentas, lupu timon ne sentas.  
 Se ne estus 'se' kaj 'tamen', mi al ĉio dirus 'amen'.  
 Se okulo ne vidas, koro ne avidas.

Se serpento amas vin, eĉ eblas ĝin uzi je via kolo.  
 Se vendisto ne mensogas, li aĉetantoj ne allogas.  
 Se vi estas ambo: eltenu; se martelo: martelu.  
 Se vi pri ĉio informiĝos, vi baldaŭ maljuniĝos.  
 Se vi pridubas kion vidas, ne kredus kion oni diras.  
 Sen laboro ne venas oro.  
 Sen ordo en afero ne ekzistas prospero.  
 Ŝennuba ĉielo nepluvu, senhoma tero neprosperu.  
 Serce dirite, cele pensite.  
 Sidu lango malantaŭ vango.  
 Silento estas konsento.  
 Singardeman Dio gardas.  
 Ŝingardo forigas hazardon.  
 Ŝlosilo uzata ruston ne konas.  
 Ŝparo de tasko estas edziĝo al jam graveda virino.  
 Sperta mano ne restas sen pano.  
 Ŝteletiston oni batas, ŝtelegiston oni ŝatas.  
 Ŝtomako malsata nur pri pano meditas.  
 Ŝtormo en akva glaso.  
 Ŝuldo estas unua heredanto.  
 Sunu en bieno kaj pluvu en ĵardeno.  
 Tablo kovrita faras amikojn.  
 Taksi la sanon ni lernas en malsano.  
 Temp' estas valoro, simile al oro.  
 Tempo toleras, sed vero aperas.  
 Tempo venos, zorgon prenos.  
 Timo havas grandajn okulojn.  
 Timo obeigas honte, konvinko obeigas volonte.  
 Tolaĵon malpuran lavu en la domo.  
 Tranĉi rekte en la kamion.  
 Tro da libero kondukas al mizero.  
 Tro da metioj, profitoj nenias.  
 Tro grandaj kalkuloj kondukas al nulo.  
 Tro malproksima oriento, jam estas okcidento.  
 Troviĝas semo en ĉiu rosino.  
 Tute libera, kiel birdo aera.  
 Unu guto plenis la glason.  
 Unu ĥako kverkon ne faligas.  
 Unu hirundo printempon ne alportas.  
 Unu pri botoj, alia pri potoj.  
 Unu, du, tri, kvar, kaj finita la far'.  
 Unua paŝo iron direktas.  
 Unueco donas fortecon.  
 Urtikon frostoj ne difektas.  
 Valoras ne la vesto, valoras la enesto.  
 Valoron de objekto ni ekkonas post difekto.  
 Venas profito, venas merito.  
 Vera opinio montriĝas en ebrio.  
 Vesto homon prezentas.  
 Vian vivon ĝuu, sed fremdan ne detruu.  
 Virina rideto pli kaptas ol reto.  
 Virino kolera pli ol hundo danĝera.  
 Vivi kun iu kiel hundo kaj kato.  
 Vivo glate ne fluas, ĉiam batas kaj skuas.  
 Vivu mizere, sed vivu libere!  
 Vojon batitan herbo ne kovras.  
 Volu-ne volu, elekto ne ekzistas.  
 Vortojn ŝparu, agojn faru.  
 Zorgu pri vi, kaj nenion pli.  
 Zorgu vivon vian kaj lasu vivi alian. . .



*HÉLÈNE FALK-BRACKE*



Ĉiama kunlaborantino, antaŭa sekretario kaj longtempe estranino de EBG